



MARTINUS
INSTITUT

Kosmos

LA KOSMOLOGIO DE MARTINUS

Martinus:

La regno de la difilo

Martinus:

Gvidaj informoj pri
mia spirita laboro

Mathias Dalmose:

Rilate al Oomoto

Ole Therkelsen:

Ananai Kyo kaj
Oomoto

L.L. Zamenhof:

I-a Kongresa
parolado, 1905

Erik Gerner

Larsson:

Martinus 5, La dia
kread-principo

Ole Therkelsen:

96-a UK en Kopenhago



Unua kongresa parolado de Zamenhof

*Kion disigis ce unu miljaro
Tion kunigis Bulonjo ce l' maro
Augusto 1905
L. Zamenhof*

Manskribita poemo de Zamenhof sur la fronta paĝo, kiu montras foton de la fama organizinto Michaux kaj d-ro Zamenhof.

Venontjare 23-a–30-a julio 2011

la 96-a UK okazos en Kopenhago, kaj miaj pensoj iras al la unua kongresa parolado de Zamenhof en la 1-a UK en 1905 en la franca havenurbo *Boulogne sur mer*. Oni povas nur profunde admiri Zamenhof pro sia modesto. Unu el la fruaj ekzemploj estas lia respondo al la invitletero de Michaux, la fama organizinto de la unua esperanta kongreso en 1905. Unue, en septembro 1904 li skribis modeste al Michaux: “Multe helpi al vi per iaj bonaj konsiloj mi ne povas, ĉar sidante ĉiam dome mi tre malmulte konas la mondon kaj mi neniam ankoraŭ partoprenis en ia kongreso aŭ publika festo”. – Sed post kelkaj monatoj, kiam li eksciis ke oni planas ceremoniojn honorajn al li, li skribis al Michaux, en marto 1905:

“Mi tre petas Vin, akceptu en la programon de la kongreso nenian punkton, kiu havas iun rilaton al mia *persono*. Mi tre volas, ke la kongresanoj vidu en mi ne la aŭtoron de Esperanto, sed nur *simplan esperantiston* [...] La aŭtoro de Esperanto en la kongreso devas esti rigardata kiel mortinta kaj neekzistanta; por la kongreso devas ekzisti nur la *afero*. Neniam kaj nenie devas esti elparolata la vorto “majstro” k.t.p. [...] Mi prezidos en la kongreso ne kiel aŭtoro, sed nur kiel “la plej kompetenta esperantisto”. [...] Nia afero prosperados nur en tia okazo, se ĝi estos ĉiam absolute senpersona”.

Estas interese, ke Zamenhof iamaniere malkovras sian intuician aŭ kosman religiecon per la fina poemo “Sub la verda standardo”. Li sentas, ke la esperanta afero estas kondukata per iu plej alta Forto. Li scias, ke la mondlingva projekto estas planata, gvidata kaj benata de la Providenco. Legu pri “Preĝo sub la verda standardo” kaj pri “la misteraj fantomoj”, kiuj flugis tra la aero de la salono.

**Unua prelego en 1930, 80-jara jubileo**

En decembro 1930 Martinus la unuan fojon publike prelegis. Sur ĉiun seĝon li metis informilon pri sia spirita laboro, kaj nun vi povas legi ĉi tiujn historiajn vortojn en la artikolo “Gvidaj informoj pri mia spirita laboro”. Do en ĉi tiu numero vi trovos kaj *la unuan prelegon* de Martinus kaj *la unuan kongresan paroladon* de Zamenhof.

Oomoto kaj la kosmologio

Mathias Dalmose skribis artikolon “Rilato al Oomoto” pri sia trimonata vizito ĉe la religia movado “Oomoto” en Japanio. Usonano Joel Brozovsky, kiu dum 13 jaroj deĵoris ĉe Esperanto-sekcio de Oomoto, somere 1998 estis en Klint. En E-Kosmos n-ro 3-1998 Joel skribis pri sia impresoj: “La Kosmologio de Martinus estas logika klarigo pri la universo, pri la vivo, kaj pri la rolo de la homo en la vivo. La instruoj multe kongruas kun tiuj de Oomoto, sed venas el logika vidpunkto anstataŭ religia”. – Legu pri la impresoj de Mathias sur paĝo 11.

Ole Therkelsen



La regno de la difilo

de Martinus

1. Kiam talentokerno plenumas sian mision, la tagkonscio liberiĝas por aliaj taskoj

Per la analizo de la kreiĝo de la talentokerno ni ricevas vivan ekkomprenon de tio, kiel organismo iom post iom konstruiĝas. Kiam viva estulo per certa intereso ekkulturas iun aŭ alian formon de manifestado kaj per tio ripetas la diversajn movospecojn aŭ energiaktivecojn, sur kiuj tiu formo de manifestado baziĝas, tiuj movospecoj aŭ energiaktivecoj fariĝas kutimo. Kiam movospeco estas fariĝinta kutimo, tio signifas ke ĝi pli aŭ malpli povas aktivigi sin mem, tiel ke la koncerna viva estulo ne bezonas partopreni tiun ĉi aktivecon. Tiu-maniere la viva estulo ricevis kapablon sin movi sen mem esti okupita pro la partoprenado en tiu movo. Ni povas promeni laŭ vojo kaj samtempe paroli kun alia estulo sen bezoni dediĉi al la movado de la kruroj iun konsiderindan kvanton da maldorma tagokonscia atento. Nur tiam, kiam io eksterordinara okazas, nia propra mio, el certa vidpunkto esprimebla kiel “la patromio”, devas interveni. Tiam la koncerna parto de la kruroj doloras. Kaj per la doloro, la patromio estas atentigita pri

la okazaĵo kaj povas fari ion por forigi la kaŭzon de la doloro. Kiam la doloro estas forigita, la tagokonscio denove liberiĝas de la zorgado pri la funkcio de la kruroj. Tiam la kruroj refoje mem povas plenumi sian mision, aŭ tion, por kio ili estas destinitaj.

2. Nia organismo estas kombino de enkarniĝintaj estuloj de subaj spiraloj

Efektive ĉiu organo en la organismo estas konstruita kaj tenata en pozicio fare de talentokerno. Sekve la kor-funkcio, la pulmfunkcio, la spirado, la glandaj funkcioj ktp estas koncentritaj ĉirkaŭ, kaj bazitaj sur, sia propra talentokerno, kio efektive signifas mio kun ties superkonscio. Tia talentokerno do estas viva estulo. Organismo de viva estulo sekve efektive konsistas el serio da vivaj estuloj de subaj spiraloj, kiuj estas kunligitaj dank’ al sia kapablo kunlabori favore al pli granda tuto. La apero de nia propra organismo kiel viva estulo sekve estas kombino de enkarniĝintaj vivaj estuloj de subaj spiraloj. Tiel, ĉiu organo ekde la cerbo, la koro, la pulmoj, la stomako kaj suben al la plej malgrandaj glandaj

kaj ĉelaj funkcioj estas vivaj estuloj, enkarniĝintaj en nian organismon, kaj kunligitaj pere de nia propra mio kaj ties speciala sinteno, speciala avido kaj evoluŝtupo en la spiralciklo. La mio devas uzi la kunlaborantecon de tiuj en subaj spiraloj situantaj vivaj estuloj por plenumi siajn specialajn dezirojn pri kreado kaj vivspertado. Kaj ĉar tiuj sube situantaj estuloj en la sama maniero ĝuste bezonas tian kunlaboron, ja, eĉ tute ne povas kontentigi sian avidon por vivspertado kaj manifestado krom per ĝuste tia kunlaboro, ni ĉi tie vidas kiel dia la tuta vivprincipo efektive estas, kaj kiel necese estas, ke ĝuste ĉiuj tiuj mikromioj kunlaboru en la intereso de la tuteco, same kiel ni vidas, kiel estas absolute necese, ke la makromio sammaniere kreu kondiĉojn por ne mem ĝeni tiun kunlaboron.

3. La makromio mem suverene regas la organismon

Ĉu la makromio do povas ĝeni la kunlaboron de tiuj estuloj kaj per tio ilian vivon? – Jes, en la plej alta grado. Ĝi estas la ĉefmio kaj havas la suverenan potencon super la tuta organismo. Ĝi decidus, ĉu tiu organismo estu flegata kaj zorgata laŭ la leĝoj de sano kaj bonfarto, aŭ ĉu ĝi estu malzorgata kaj mistraktata ekzemple per ĝuado de alkoholo aŭ alia misinflua ĝuado de venenaj aŭ malsanigaj substancoj, kiuj tute ne taŭgas kiel nutraĵo. Ĝi ankaŭ povas decidi, ĉu la organismo havu la necesan kvanton da ripozo kaj dormo aŭ ne havu ĝin. Ĝi povas malzorgi la kreadon de kondiĉoj por la perfekta kunlaboro inter siaj mikroestuloj, kaj tiam ĝi mem fariĝas malsana kaj senpova. Tiel videblas ke organismo efektive estas institucio, kies funkciado estas realigata de diversaj grupoj de vivaj estuloj. Ĉiu grupo de estuloj do efektive estas iuspeca specialisto por fari specialan energiaktivigon, specialan laboron kiu

estas necesa por la tutaĵo. Tiu tutaĵo ja estas la organismo de la makromio, kiu por tiuj mikroestuloj estas ilia universo. La organismo de viva estulo tiel estas scenejo, mondo, en kiu grandega nombro da estuloj havas ŝirmon, loĝejon kaj eblon labori, kaj per tio la por ili necesajn kondiĉojn por vivo kaj sortorealiĝo.

4. La reĝa tasko de la makromio en la mikrokosmo

Organismo estas grupo de vivaj estuloj sur diversaj ŝtupoj, reprezentantaj diversajn suprajn kaj subajn spiralciklojn. Kiel la plej alta aŭtoritato por tiu grupo de vivaj estuloj do ekzistas tiu mio, kiu suverene regas la organismon, nome la “makromio”. Rilate al tiu mio, ĉiuj aliaj mioj estas subordigitaj, ĉar ili ĉiuj sen escepto apartenas al subaj kosmaj spiralcikloj. Tial ni devas kompreni kaj esprimi tiujn estulojn kiel mikrokosmon. Kaj simile, la makromio montriĝas kiel “reĝo” aŭ la plej alta reganta faktoro en tiu kolekto de vivaj estuloj, kiu konsistigas ĝian organismon. Sed ĉar ĝia interesosfero reprezentas multajn formojn de avidoj kaj deziroj, multajn diversajn formojn de vivtravivaĵoj kaj kreoprocesoj, ĝi bezonas amason da helpantoj, ja ne nur milojn, sed multege da estuloj, kiuj nombriĝas en milionoj. Sed la makromio ja ne kapablas korespondi kun ĉiu unuopa individuo en tiu arego da estuloj. La kunlaboro inter la makromio kaj tiuj mikroestuloj ja ankaŭ estas realigata de tuta serio da “subreĝoj”, kiuj sub si havas helpantojn, administrantojn kaj gvidantojn kaj tiel daŭre en la subajn spiralciklojn interne de la sama organismo. Tiuj subreĝoj de la makroestulo regas ĉiu sian regionon en la intereso de la tutaĵo aŭ la makroindividuo, same kiel la makromio estas ricevinta la superan komandon super tiu kolosa regno por ĝin regi kaj gvidi en la intereso de la tutaĵo, ne nur interne ene de la propraj internaj regionoj, sed

ankaŭ eksteren, tiel ke la tuteco de tiu organismo aperas kiel ŝtato, universo aŭ galaksio, kiu estas plene en kontakto kun la ekstera mondo kaj la intereso de la tutaĵo.

5. La terbloba talentokerno por la mortiga principo

Niaj subreĝoj, kio signifas la provincestrojn por la regionoj de niaj kapabloj kaj talentoj, estas la mioj de niaj talentokerno. Ĉar tiuj subreĝoj ja havas la taskon regi siajn regionojn en kontakto kun la tutaĵo interne de la organismo, ni povas nomi ilin “gardanĝeloj”. Ĉar la terglobo estas organismo, kiu troviĝas sur la sama ŝtupo en sia spirala ciklo kiel la terhomoj, ĝi kreas la samajn kondiĉojn, kiel la terhomoj faras en la sia. Tial ni per rigardo al la tergloba mio kaj ĝia organismo, kiu ja estas nia provizora hejmloko en la universo, povas vidi nian propran organismon kaj per tio, la terenon de nia propra regno.

La tergloba mio mem estas nia primara gardanĝelo, nia reĝo. Sub tiu venas la talentokerno de la tergloba mio por la aktivigo de la mortiga principo, kiu ja ĝis nun estis la plej supera kaj superrega ene de la regiono de ĝia organismo. Kun la paso de tempo, tiu gardanĝelo ricevis la nomon “la malbonulo” aŭ “la diablo”. Ĝi estas gardanĝelo kaj absolute nemalhavebla en la ebligo de vivtravivado kaj manifestado kadre de la cikloprincipo. El kosma vidpunkto, tiu gardanĝelo ne estas diablo, sed same dia en sia naturo kiel lumaj anĝeloj. Sen tia gardanĝelo neniu ajn vivtravivado povus okazi. Ĉu ni do ne devas danki kaj laŭdi Dion, ke ekzistas tia gardanĝelo, kvankam ĝi estas la originulo de ĉio, kio apartenas al la mensa mallumo? Jes, ĉar sen la agado de tiu estulo ne estus iu fono por lumtravivado. Kiel la estuloj fariĝus kapablaj travivi sin mem kaj siajn ĉirkaŭaĵojn

sen kontrastoj? – Ĉia vivtravivado ja nur estas nuancoj aŭ gradoj de mallumo kombinita kun lumo. En la biblio tiu gardanĝelo estas esprimata kiel “la serpento”, kiu kaŭzis, ke Adamo kaj Eva aŭ la vivaj estuloj, povas frandi la fruktojn de la arbo de scio. Do estas tiu gardanĝelo, kiu estas malantaŭ la gvidado de la kreado de ĉiuj armiloj, kaj la el tio rezultanta kulmina kapablo, kiun la terhomoj tiukampe reprezentas.

6. La tergloba talentokerno por lummanifestado

En la terhoma menso nun estas kreita tre forta kaj malluma fono, sur kiu la lumo povas reliefiĝi kaj per tio fariĝi alirebla por sensado kaj travivado. Sed per tio la gardanĝelo de la mallumo ja finis sian mision interne de la psiko de la tergloba mio. Ĉar samgrade kiel tiu ĉi fono kreskis, densiĝis kaj fortiĝis, ja ĝuste estiĝis la eblo por la reliefigo de la lumo kaj per tio ties alireblo por travivado. Tiel la interesosfero de la tero samgrade fariĝis la lumo. Pli kaj pli da ripetitaj lummanifestaĵoj estis la rezulto, kaj ekestis eblo por reenkarneigo de la reĝo de la lumo, do talentokerno, kiu devos transpreni la interesosferon de la tergloba mio kaj krei lumon en ĝia teritorio. Kaj tia vicreĝo jam enkarniĝis en la psiko de la tergloba mio kaj estas do la primara gardanĝelo de ĉiuj lummanifestaĵoj. Tiu reĝo aŭ gardanĝelo respondecas pri la komencanta kreigo de ĉiuj humanaj religioj, ja, ĉiuj humanaj fenomenoj. Ĉio, kio esprimiĝas per la nocio “pli alta kulturo”, “la promesitaj novaj ĉielo kaj tero”, kio reale estas la samo kiel tiu de ĉiuj homoj sur la tero dezirata mondopaco, tio realiĝos sub ĉi tiu gardanĝelo de la homaro aŭ la tergloba talentokerno por lummanifestado. La teritorio de tiu ĉi gardanĝelo estas la loko de kie eliras la mondliberigantoj, same kiel la mallumaj mondliberigantoj eliras de la gardanĝelo de la mallumo.

7. La fizika enkarniĝo de la gardaĝeloj

Nun oni eble demandos, ĉu tiuj lumaj kaj mallumaj gardaĝeloj enkarniĝas, kaj kie estas iliaj fizikaj korpoj? Jes, kompreneble ankaŭ tiuj ĉi gardaĝeloj estas subordigitaj sub la leĝoj de la reenkariniĝo kaj devas enkarniĝi en la materion kiel ĉiuj aliaj vivaj estuloj. Ili ja sammaniere devas utiligi mikroestulojn en sia regiono, alie ili ja ne povus krei organismojn, kaj sen organismoj ili ja tute ne povus labori. La mikroestuloj de ĉi tiuj gardaĝeloj estas la vivaj fizikaj estuloj, kiuj povas esti animitaj de ilia spirito aŭ la estuloj, por kiuj aktivigo de la specialaj specoj de manifestado, kiuj okazas sub la gardaĝeloj de lumo respektive mallumo estas granda vivmotiviga faktoro. Rilate al la fizika korpo aŭ organismo de la malluma gardaĝelo, ĝi estas identa kun ĉiuj estuloj kiujn ni nomas bestoj. La bestoj estas animitaj de la konscio de la malluma gardaĝelo kaj do konsistigas la fizikan korpon de tiu ĉi aĝelo. Ĉar tiu ankaŭ eniras en la sferon de la terhomoj kaj trovas ilojn kaj talentokernojn por la manifestado de la mallumo en la psiko de la terhomoj, tiuj samgrade estas mikroestuloj en la konscio aŭ psiko de la malluma gardaĝelo. Ĉi tiuj estuloj do efektive estas infanoj de ĉi tiu gardaĝelo.

Pensu pri Valhalo kaj la aliaj mortigaj formoj de religioj! – Ĉie kie la zonoj de la mortiga principo troviĝas, ili estas la tereno de la malluma gardaĝelo. Dum la enkarniĝo de la malluma gardaĝelo komenciĝas en la viandomanĝanta planto kaj pluiras en bestoj kaj terhomoj, en kiuj ĝi mortos, la naskiĝo de la nova luma gardaĝelo komenciĝas en la terhomoj, kiuj komencas fariĝi humanaj kaj alproksimule amaj. La regno de la luma gardaĝelo estas ĉio, kio estas kulturkrea, celas forigi militon favore al humaneco kaj amo

al la proksimulo. Ĉi tiu spirito estas enkarniĝinta en ĉiuj estuloj, kiuj, ĝis pli aŭ malpli granda grado, sin disponebligas por manifestado de lumo kaj amo.

8. La plej alta vivtravivaĵo

Se la makromio plenumas sian reĝan taskon laŭ la intereso de la tuteco interne en la regionoj de la mikroestuloj de sia organismo kaj eksteren al siaj ĉirkaŭaĵoj kaj kunestuloj, tiam ĉi tiu makromio ekzistas kaj aperas kiel viva estulo laŭ la bildo de Dio. Kompreni ĉi tiun respondecon de la makroestulo al la mikroestuloj, kunestuloj kaj makroestuloj estas kompreni la vivmisteron. Kompreni la vivmisteron en maldorma tagkonscia stato estas la samo kiel havi “kosman konscion”, konscio, kiu denove estas la samo kiel la sankta spirito aŭ la konscio de Dio. Ĉar ĉi tiu stadio donas al la individuo la plej altan vivtravivaĵon, la plej altan senton de agrablo, la plej altan travivaĵon de scio, forto kaj kapablo, ĝi estas la kulmino de la vivo kaj la celo, al kiu ĉiuj homoj de la tero rapidas. Tiel, ĉiu unuopa el ni estas reĝo en propra regno, kaj aspiras al formo de regado, kiu estas analoga kun la regado uzata de la plej alta makroestulo aŭ de la reĝo de la universo mem, la eterna Dio.

Ĉi tiu artikolo baziĝas sur manuskripto, kiun Martinus verkis kiel preparon al prelego en la prelegejo de la Instituto dimanĉe la 24-an de aprilo 1949. Prilaboro kaj aldono de alinetitoloj estas faritaj de Ole Therkelsen kaj aprobitaj de la konsilio la 22-an de aprilo 1997. La artikolo “*Gudesønnens kongerige*” estis publikigita unuafoje en la dana *Kosmos* n-ro 3-1998. Ĝi estas daŭrigo de la du antaŭaj artikoloj “*Gardaĝeloj en la servo de la nacio*” kaj “*La gardaĝeloj de la lumo kaj la mallumo*”.

Traduko Henning Sato von Rosen, Hokan Lundberg kaj Jonas Dalmose en 2010

Gvidaj informoj pri mia spirita laboro

de Martinus



1. Nova amo- kaj saĝoinstruo

Ĉar la tipo de spirita scio, kiun manifesti fariĝis mia tasko, estas esprimo de tute nova spirita mondimpulso, kio ĉi-kaze signifas: tute nova amo- kaj saĝoinstruo, ĝi tute ne estas klasifik-ebla kiel kopiaĵo de iu ĝis nun ekzistant-ta koncepto aŭ imago pri la plej altaj problemoj de la vivo, sed male, aperas kiel izolita rezulto de mia propra en pura formo evoluigita spirita aŭ kosma sensaro, subtenita de la superaj, grandiozaj kristofortoj, pri kiuj doniĝis al mi akceptemo. Tial povas esti malfacile por la verserĉanto tuj kompreni mian manifestmanieron aŭ iĝi familiara kun ĉi tiu nova kristoimpulso, precipe ĉar mia materialo nur post kelkaj monatoj aperos en presita formo. Tial mi trovis utile ĉi tie doni gvidajn informojn.

2 Mia misio estas esprimo de nova spirita mondimpulso

Mia tuta misio, kiu do estas esprimo de tute nova mondimpulso, celas, sen krei sekton nek alian tipon da izolita unuiĝo, konduki ĉiujn tiujn estulojn, kiuj ne plu povas senti sin inspiritaj aŭ vivigitaj per la ekzistantaj religi- aŭ kredoformoj, kaj tial plene aŭ parte estas perdintaj la kredon je la dieco de la vivo, ĝis atingo de por ilia inteligento kaj sento tute vera kaj reala ekkompreno pri la absolute justa, ĉioama kaj supera gvido de la ekzisto. Tiel la leĝo de vivo aŭ la plej alta ordono de la vivo: amu unu la alian, pli kiel scio ol kiel kredo, kaj tial tiom praktike kiom teo-

rie, estonte povos iĝi la plej alta vivbazo de ĉiu estulo. Kaj tiel daŭra paco povas esti stabiligita aŭ kreita. Daŭra paco ene de kies regiono malĝojo, milito kaj kripligo estos neeblaj, kaj tiel la regno, kiu antaŭe ne estis el ĉi tiu mondo, ankaŭ povos vastiĝi sur la terglobaj kontinentoj.

Mia misio tiel vere alcelas preparon de vojo, laŭ kiu ĉiuj ĉefaj spiritaj realaĵoj povas fariĝi vera scio por la homoj. Sed por ke afero povu iĝi scio, ĝi devas esti spertata. Tial ne sufiĉas ke la menciitaj realaĵoj fariĝis scio por mi, kaj ke mi povas klarigi ilin al aliaj estuloj. Tiuj aliaj estuloj kompreneble mem devas fari ampleksan laboron studante tiun klarigon. Tiu klarigo estas vojmontrilo, sed la vojon oni devas paŝi por atingi la celon.

3. Nova spirita informo, kiu ne baziĝas sur kredo, sed sur scio

Ĉar mia laboro tiel estas spirita vojmontrilo, pri kiu la interesiĝo de la individuo estas des pli elstara tiom, kiom ĝi komprenas sin senscia pri la vojo, kiun ĝi promenas, dum la malo validas tiom, kiom ĝi komprenas sin kontenta pri sia propra scio, aŭ opinias anticipe koni la priparolitan vojon, aŭ estas al ĝi gvidata de alia, por si pli konforma konscikampo. Kaj tio estas ja tute natura afero. Estas pri tio nenion alian diri ol tio, ke ĉiu kompreneble devas serĉi siajn spiritajn informojn tie, kie tiuj estas tiaj, kiaj havas la plej grandan inspiroforton por la koncernato, kaj

tial povas esti por li aŭ ŝi nur la plej alte stimulantaj bazo por la evoluo de la bono kaj altgiteco ene de tiu estulo. Nur tie estas la ĝusta loko en la estado por ĉiu estulo. Ĉu la menciitaj informoj de aliaj estuloj estas taksataj naivaj, superstiĉaj aŭ fantaziaj, ĉu la individuo estas budhano, islamano, judo aŭ kristano ktp. estas tute sengrave. La ĉefafero estas nur, ke ĝi aliĝu tie, kie la spirita informoj estas tiaj, kiaj havas la antaŭe menciitan influon al ĝia ĉiutaga vivo kaj konscio.

Kiel mi menciis antaŭe, mia laboro estas pretigita por estuloj, kiuj ne havas spiritan vivbazon, aŭ por vere serĉantaj estuloj, kio signifas individuojn por kiuj spirita informo estas tiel grava, ke ili havas emon, kuraĝon kaj energion sufiĉan por venki la eventualajn penojn pagendajn por alkitimiĝi al pli alta formo da scio kaj la de tio sekvanta vastiĝo de la horizonto kaj konscio de sia ĉiutaga vivo.

Ĉar tia speco da informo, kia per la nova mondimpulso malkovriĝas, fariĝas la plej grandajn ordonojn kaj idealojn de la vivo pli altgrade scio ol kredo, kio do samsencas kun tio, ke ĝi montras detale la plej grandajn leĝojn, principojn kaj bazrealaĵojn de la vivo, oni povas kompreni, ke tiu impulso estas io, al kio oni ne alkitimiĝas aŭskultante nur unu prelegon, kaj eble eĉ povas pro tiu tute miskompreni la aferon.

4. Elstare evoluigita amkapablo kaj inteligento estas bazo por la evoluo de komenciĝanta kosma konscio

Same kiel oni por iĝi eksperto pri lingvo, muziko aŭ arto devas fari profundan studon kaj ĉiutagajn ekzercojn, tiel oni ankaŭ por evoluigi tiujn kapablojn kaj talentojn, kiuj igas vera scio kaj travivaĵo ĉiujn nevideblajn realaĵojn kaj kaŭzojn malantaŭ la videbla fizika mondo, devas fari profundan laboron

en sia ĉiutaga estado forme de studoj, ekzercoj kaj trejnado, kio je amplekso tute ne estas malpli granda ol tie en la evoluo de la antaŭe menciitaj realaĵoj, precipe pro tio ke la evoluigo de la spirita aŭ kosma konscio postulas trejnadon pri pensado sendependa de tempo kaj spaco. Oni tiel devas alkitimiĝi labori pri tute novaj konscikampoj, kampoj, kiuj eble ĉimomente ŝajnas esti la plej ekstrema fantazio aŭ malvero. Kiel oni povas havi denaskan talenton aŭ lertecon pri muziko, lingvo ktp., tiel oni ankaŭ povas havi denaskajn specialajn talentojn por la evoluigo de la spirita konscio. Ĉi tie plej gravas elstare evoluigita amkapablo, kio alivorte signifas elstaran kapablon ami ĉiujn vivantajn estulojn, aŭ kapablon distanciĝi de ĉia doloro- aŭ suferoplena influo al la estado de sia ĉirkaŭo. Se oni plie ĉikoncerne havas egale elstare evoluigitan inteligenton, oni do posedas la plej alte avantaĝan talenton por la evoluigo de la nune komenciĝanta dia, spirita aŭ kosma konscio, konscio, kiu tiom superas la konscinivelon de la kutima terhomo, kiom ĉi tiu superas la estulojn kiujn ni nomas “bestoj”.

5. Kiam la nova impulso estas la konvena inspirofonto

Oni kompreneble povas ankaŭ alimaniere senti, ĉu oni havas talenton kompreni la novan, plivastigitan dian impulson. Se ekz. oni sentas nenian malemon kontraŭ malsamopiniaj estuloj, kio signifas, ke oni sentas etenditan toleron pri estuloj kun tute alia percepto pri la estado, kun tute alia vivrigardo, tio do estas esprimo ke oni troviĝas sur evolua stadio, kie oni ankaŭ iom komprenas la novan impulson. Oni ene de tiu impulso renkontos la senvualiĝon de la identeco de la estuloj kiel eternajn realaĵojn, kio signifas la ekkomprenon, ke ilia nuna fizika vivo ne estas la nura

vivo kiu doniĝis al ĉiu estulo, sed ke tiu nur konstituas unuopan eron en depasinteco daŭrigata ĉeno da fizikaj vivoj, kiujn la menciitaj estuloj estas spertintaj, kaj plie oni ankaŭ estos alfrontigata al tiu ekkompreno, ke globoj, sunoj, sunsistemoj kaj galaksioj ĉiujne konstituas “vivajn estulojn”, kaj multaj aliaj tiel nekutimaj perceptoj. Oni povas ankaŭ tiel senti, ĉu oni havas talenton pri la nova spirita scio, ĉar oni tiukaze harmonias kun la menciitaj konceptoj, dum oni je mala kazo nur kapablas kompreni ĉi tiujn fantaziaj aŭ nenaturaj, kaj la priparolita nova spirita impulso povas do esti nur absolute fermita libro, kaj ne inspirofonto, kio alie estus la kazo. Sed ja ekzistas en la esto sufiĉe da diaj fontoj, kaj oni do serĉu sian Dion kaj spiritan gvidon laŭ aliaj por si pli taŭgaj vojoj.

6. La ekbatalo pri la malaltaj inkli- noj kaj la studo de Livets Bog (La Libro de la Vivo) gvidos la indivi- duon al “la granda naskiĝo”

Ke mi sentis min instigata peri al vi ĉi tiujn informojn, estas por anticipe doni al vi malgrandan enrigardon en la naturon de la grava kaj grandioza afero pri kiu mi laboras, kaj por ke vi komprenu ke miaj prelegoj ne estas facilkomprenebla vesperdistro, sed male laborkampoj, kie oni bezonas sian tutan koncentrokapablon, penskapablon kaj nepartian sintenon por entute ricevi ekbrilojn de la grandioza dia saĝoprincipo, kiu en pli alta mondogvido nun estas decidita ankaŭ povi kompreniĝi en la regionoj de la terglobo. Se oni plie havas la bezonatan emon kaj energion ekbatali siajn denaskajn kaj kutimiĝintajn malaltajn tendencojn kaj pasiojn, de kiuj oni estas fikstenata en la malhelaj zonoj kun iliaj malsano, malĝojo kaj sufero, kaj samtempe praktikas profundan studon de mia verko “Livets Bog”

(La Libro de la Vivo), kies unua kajero baldaŭ aperos, tiukaze mi povas promesi al vi, ke vi estos kondukata al la sperto de la spirita iniciĝo, kiun Livets Bog nomas “la granda naskiĝo”, kiu reale konstituas aktivigon de la nune latentaj kosmaj organoj de la estulo, per kiuj la senskapablo de tiu estulo por senti spirite aŭ kosme tiel permanentiĝas. La individuo spertas do kvazaŭ vekigi por rigardi “tute novan mondon” malantaŭ la kutima fizika mondo. En tiu nova mondo aŭ en tiu nova horizontokampo la individuo spertas vidi la eternan vivon de la tuto kaj sin mem kiel senmortan estulon. Ĉion pri kio ĝi antaŭe devis kontenti ekscii tra aliaj estuloj, ĝi nun mem rigardas kiel realajn faktojn. Post tio la fizika mondo estas nur unuopa lokaĵo en tiu horizontokampo, al kiu ĝi nun havas aliron. Ĝi spertas do rekte la dian konsciformon: meze de portempa fizika stato esti superigita en eterne klarigata estado, ĉirkaŭbrilata de la belega agrablegaĵo de la ĉiopova Dio, forme de aliaj mondoj, aliaj homaroj kaj aliaj tipoj da spertado de vivo, kio ĉio nun estas detale kaj senobstakle videbla por la mirantaj okuloj de la, el la malluma kampo de malamo kaj milito reveninta difilo.

7. La skriba kaj perbilda prezento estas pli grava ol prelegoj

Por multaj povas ŝajni strange, ke mi ne pli ofte prelegas, ĉar pripensante la mondsituacion oni povas havi nur bonan kialon opinii tion forte bezonata aŭ necesa. Mi volas pri tio menci, ke la grandioza movado, pri kiu mi laboras, nur estas en sia komenciĝo, kaj ke la instigego al mi pri la transigo aŭ transformigo de mia kosma materialo en fizikan bildo- kaj tekstformon estas tiom granda, ke mi ne povas taksati responde apliki mian tempon nur por prelegi, ĉar mi tiel estus malhelpata pri la plua

skriba kaj perbilda prezento de la, por mia misio tre grava restanta parto de mia spirita materialo. Ankaŭ rilatas al ĉi tio, ke miaj prelegoj ankoraŭ ne estas publikaj, sed nur prezentiĝas al miaj privataj amikoj kaj homoj, kiuj anticipipe supoze havas kvalifikaĵojn, kiuj kapabligas ilin per speciala ricevemo kaj interesiĝo esti helpo por mia laboro.

Poste, laŭ la plukresko de la manifestiĝo de mia materialo, miaj kvalifikitaj helpantoj pluenperos ĝin forme de instruado kaj prelegoj, same kiel mia verko "Livets Bog", kies unua kajero do eldoniĝos post kelkaj monatoj, per siaj bildoj kaj teksto fundamente parolos kaj gvidos la riceveman estulon al dia

proprarigardo de la vivo, al sperto de Dio kiel scio, kaj tiel gvidita al pli alta formo da estado.

Esperante ke la leganto havu kapablon ĝuste min kompreni, mi sendas al li aŭ ŝi amikan saluton.

La artikolo estas la unua enkonduko al la spiritscienco, kiu estis disdonata al la aŭskultantoj ĉe la unua prelego de Martinus en publika prelegejo de popola altlernejo en Forhåbningholms Allé 18, Frederiksberg, la 01.12.1930. Unue aperinta en dana *Kosmos* n-ro 5-1981, due en la libro *Artikolkollektio 1*, artikolo n-ro 2, 2003.

Traduko Mathias Dalmose en 2010



Martinus prelegas



Rilate al Oomoto

de Mathias Dalmose

Ĉi-jare tri monatojn ek de februaro mi restis ĉe la religia movado Oomoto en Japanio. Mia celo estis instrui Esperanton kaj havi eblecon praktiki la japanan lingvon, kiun mi studis ĉe la universitato de Kopenhago. Ĉar mi ne estas la sola kosmologo, kiu vizitis Japanion nek la sola kiu restis ĉe Oomoto, mi ŝatus komenci per mallonga superrigardo pri la rilato inter la movadoj de Martinus kaj Oomoto. Poste mi rakontos iomete pri miaj spertoj en Japanio, kaj fine mi ŝatus diskuti la rolon kiun, laŭ mia kompreno, ludas Esperanto en la antaŭe menciita rilato.

Kosmologio en Japanio

En septembro 1954 Martinus ricevis de la japana religia movado Ananai-Kyo inviton pri partopreno en mondreligia kongreso, kiu estis okazonta en la urbo Ŝimizu. La celo de la kongreso estis “aŭdigi al homoj la dian voĉon de la ĉielo”, kaj tiel, laborante kun saĝuloj kaj sciencistoj, atingi fundamenton por kreado de mondpaco. Krome menciigis en la invito ke se la mondo estas lasata daŭrigi la individualismon kaj egoismon kiu kreadas la nuntempajn batalojn kaj militojn, la homaro detruigis. Martinus skribis pri la invito:

*“Ke la invito de tiuj pacamantaj homoj forte aktivigis miajn pensojn, estas kompreneble. Kio povus esti malantaŭ tiu invito? – Kion ĝi povus signifi por miaj misio kaj movado, kiuj ja celas doni al la homoj la fundamenton por la mondpaco, kio signifas ekkomprenon pri la eterna mondbildo. Sed ĉu estas seriozeco malantaŭ la invito? – Ĉu temas pri homoj kiuj komprenus miajn analizojn?” (Martinus, *Fra min rejsse til Japan og Indien*, p. 3).*

Martinus notis ke almenaŭ pri la antaŭe menciata “detruigo de la homaro” ilia mondbildo ne kongruas kun liaj analizoj:

*“Tiu, kiuj konas la mondbildon tra miaj analizoj, scias, ke la homaro absolute ne estas en ia danĝero, kiu rezultus en katastrofo, se homoj ne urĝe savos ĝin.” (Martinus, *Fra min rejsse til Japan og Indien*, p. 3).*

Tamen li opiniis ke kiam oni invitas saĝulojn kaj sciencistojn de la tuta mondo por ke ili helpu konsili pri la kreado de mondreligio, tio signifas ke oni pretas aŭskulti, lerni kaj adaptisian mondbildon laŭ tiu konsilado, do Martinus pripensis kaj petinte konsilon de Dio ekkomprenis ke la invito ja estas voko de tiu. Martinus do akceptis la inviton, ekflugis la 20-an de oktobro kaj partoprenis la mondreligian kongreson, kie li pro manko de kompetenta interpretisto ne kapablis transdoni detalan klarigon pri sia mondbildo, sed per la simboloj, kelkaj tradukitaj tekstoj kaj ioma interpreto, li sukcesis klarigi la bazan strukturon de sia kosmologio. Fine de la vojaĝorakonto li skribis:

“Dum mia vojaĝo mi vidis, ke oni same en Azio kiel en Eŭropo kaj la cetera mondo, atendas la solvon de la mistero de la vivo, la sencon de la vivo, la analizojn de la universo aŭ la mondotuto, kontroleblajn per la evoluinta hu-

mana inteligento.” (Martinus, *Fra min rejse til Japan og Indien*, p. 73).

Dum la somero en 1965 Ib Schleicher vojaĝadis en Japanio du monatojn prelegante pri la kosmologio. La turneo estis aranĝata de Oomoto, kiu ankaŭ disponigis interpretistojn kiuj lerte japanigis la esperantan parolon de li, kaj estis granda helpo por facila komunikado dum la tuta vojaĝo.

En 1995 Ole Therkelsen vizitis dum kelkaj tagoj Oomoto Centron en Kameoka okaze de esperanta kongreso kaj prelega mondvojaĝo.

Esperantoinstruisto ĉe Oomoto

Antaŭ mia alveno al Oomoto Centro en Kameoka, proksime al Kioto, mi faris kun ili interkonsenton ke miaj taskoj konsistas el instruado de Esperanto kaj verkado de artikoloj por ilia esperantorevuo. Krome, alveninte tien mi estis petata traduki malgrandan libron el la angla en Esperanton. Tiel formiĝis mia ĉiutago, ke mi prilaboris la diversajn taskojn, kaj klopodis kapti ĉiutage la okazon ekzerci iomete la japanan lingvon kun homoj tie. Krome mi plurfoje estis petata instrui en aliaj oomotejoj, pro kio mi interalie iris al Osaka, Niigata, Tokio kaj Kumamoto.

Por mi la restado ĉe Oomoto estis malofta ŝanco esti parto de ĉiutago en la kulturo pri kiu mi okupiĝis jam tri jarojn ĉe la universitato, kaj mi eĉ havis la okazon sperti la vivon kun homoj kaj familioj ĉe kiuj mi ĝuis amikecon kaj rektan sperton pri japanaj valoro, zorgo kaj ĝojo, ne kiel turisto sed kiel membro de la grupo. La japana socio rilatigas homojn laŭ grupoj, kiel ekz. familioj, kolegaroj ktp., kaj mi do estis parto de la kolegaro en la centro en Kameoka, kaj ĝuis kun ili amikecon, festojn kaj amuziĝadon kiel kinon, karaokeon kaj banadon. La japana kulturo havas specialan tradicion pri publikaj banejoj, kiuj origine devenas de la naturaj varmaj fontoj, kie oni pro

sanigaj kaj sociaj kialoj pasigas kelkan tempon preskaŭ ĉiuvespere. La banejo estas perfekta forumo por babilado pri ĉio kaj nenio, ofte pri la vetero – jam ĉ. monaton antaŭ la ekfloro de la ĉerizfloroj mi rimarkis ke la viroj en la loka banejo komencis diskuti kiam ekzakte ili ekfloros kaj kiom da floroj aperos ktp., ĉar tio, la ĉerizflorado, estas alia tre grava elemento de la kulturo. Dum festeno ĉe amikiĝinta familio, amiko klarigis al mi ke la ekfloro, malmultaj tagoj kun belegaj petalaroj kaj la rapida falo simbolas por ili la belecon kaj rapidecon de la vivo, kaj la morto. La tradicio kaj emocioj estas tiom fortaj ĉirkaŭ tiu koncepto, ke oni dum la florado povas vidi ĉie grupojn da japanoj babilantaj kaj manĝantaj sub la belaj floroj.

Venis iun tagon al la centro de Oomoto grandaĝa sinjoro, kiu jarojn antaŭe laboris kiel tradukisto en la internacia fako de Oomoto. Pro intereso pri Esperanto kaj tio ke mi estis tie eksterlanda esperantisto li venis min saluti, kaj eltrovinte ke mi estas dano, li demandis ĉu mi konas s-ron Schleicher. Montriĝis ke li estas unu el la du interpretistoj kiuj helpis al Ib dum lia restado kaj prelegado en 1965. S-ro Tatsuo Huĝimoto mem ne estas religiulo, kaj do laboradis ĉe Oomoto pro ties granda okupiĝo pri Esperanto kaj la bezono pri lertaj tradukistoj. Bedaŭrinde mi estis survoje al Osaka, do mi ne havis tempon plu babilu kun s-ro Huĝimoto, sed li invitis min veni al lia hĵemo en Kioto, kaj je la fino de mia restado mi finfine trovis tempon kaj eblon viziti lin kaj lian edzinon. Mi pasigis tre agrablan tagon kaj vesperon ĉe ili, kie ni babilis pri multaj interesaj aferoj, precipe lingvo, ĉar s-ro Huĝimoto kaj mi ambaŭ havas pasion pri tio. Cetere mi estis kunportinta la taglibron de Ib Schleicher, el kiu mi laŭtlege tradukis kelkajn partojn kie Ib priskribas okazaĵojn kiujn ili kune spertis antaŭ 45 jaroj.



Tatsuo Huĝimoto kaj Mathias Dalmose

Esperanto kiel interhumana komunikilo

Ĉe Oomoto oni alte taksas Esperanton kaj relative multe laboras pri disvastigo de ĝi. Pro tio troviĝas ene de la organizo pluraj tre lertaj esperantuzantoj. Mi havis la plezuron amikiĝi kun kelkaj el tiuj, kaj tre ĝuis la mirindan sperton de tute senobstakla komunikado per neŭtrala lingvo kun amiko kies nacia lingvo tiom malsimilas al la mia. Tio estas verŝajne sperto konata al preskaŭ ĉiu esperantisto, sed konsiderinte la aferon en ĝia religia kunteksto, mi atingis la konkludon ke Esperanto estas ne

nur bona lingvo, sed pli ol lingvo. La lingvo enhavas denaske internan ideon pri frateco kaj humaneco, kiu de tempo al tempo ŝajnas nuligi la diskuteblajn diferencojn inter la “fratoj”. Do, kvankam mi konsideras min logike rezonanta individuo kaj mia kunparolanto estas religiulo, ni havas tamen jam – konscie aŭ nekonscie – komunan konsenton forme de la lingvo uzata kaj ties fundamenta kompreno pri interhoma egaleco kaj reciproka respekto.

Laŭ tiu koncepto, kaj la fakto ke pluraj novaj religiaj kaj alie spiritaj movadoj ekuzis Esperanton, ŝajnas al mi probable ke la lingvo mem estas ilo kiun uzas la Providenco por krei komunan fundamenton inter movadoj kies spiritaj valoroj ankoraŭ ne plene kongruas unu kun la alia. Tiel mi rigardas la rilaton inter Oomoto kaj Martinus-Instituto ne spiritscienca aŭ religia interŝanĝo, sed esperantista amikeco, kiu, pere de la antaŭe menciitaj kvalitoj de Esperanto, servas ne nur kiel rimedo por privata korespondo, sed kiel forumo kie ekzerciĝas kaj fortiĝas la fundamento kaj idealoj de la nova mondimpulso.



Adiaŭa festeno kun amikoj ĉe Oomoto

Ananai Kyo kaj Oomoto

de Ole Therkelsen



En junio 1954 Martinus ricevis leteron de la religia pacmovado “Ananai Kyo” kun internacia centro en urbo Shimizu, Japanio. La anstataŭiganto

Post la vizito en 1954 Martinus ne havis plian kontakton kun Ananai Kyo. En 1956 dum la Universala Kongreso de Esperanto en Kopenhago



Martinus kun gvidantaj japanoj, hindoj kaj filipinoj dum la mondreligia kongreso en centro de Ananai Kyo en japana urbo Shimizu aŭtune 1954

estiĝis bona rilato inter la esperantaj sekcioj de Oomoto kaj Martinus-Instituto. Jam en 1957 en Kopenhago Martinus ricevis viziton de du oomotanoj, s-ro Yasumi Hirose kaj s-ro Eiji Deguchi, kiuj ambaŭ estis edzoj de filinoj de la tria spirita gvidantino de Oomoto, s-ino Naohi Deguchi.

En siaj kosmaj analizoj Martinus skribas pri unu Dio, unu universo kaj unu mondlingvo.

Antaŭ pli ol 100 jaroj la

de la fondinto s-ro Yonosuko Nakano, Shin Negami, prezidento de Ananai-Kyo, invitis Martinus prelegi en la dua monda religikongreso en Japanio inter 23.10.1954–03.11.1954. Bonvolu vidi la historian foton, kiu atestas la partopreton de Martinus.

Iam Yonosuko Nakano estis oomotano, sed li forlasis Oomoton kaj fondis propran organizon Ananai Kyo kun kelkaj similaj ideoj pri mondreligio kaj mondopaco. Hodiaŭ Ananai Kyo daŭre ekzistas, sed ne estas kunligo aŭ rilato inter Ananai Kyo kaj Oomoto – laŭ informo de s-ro Masamichi Tanaka ĝenerala sekretario de Esperanto Sekcio de Oomoto.

fondinto kaj unua spirita gvidantino de Oomoto, Nao Deguchi, ankaŭ parolis pri unu Dio, unu mondo kaj unu interlingvo. Bonvolu vidi la foton de la memorŝtonon en Kameoka.



La unuismo de Oomoto: Unu Dio, Unu Mondo, Unu Interlingvo

Foto Mathias Dalmoose

Parolado en la unua Universala Kongreso

de Zamenhof



La Unua Kongreso Esperantista kun 688 partoprenantoj okazis en franca havenurbo, Boulogne sur Mer, la 5-an de aŭgusto 1905.

Estimataj sinjorinoj kaj sinjoroj! – Mi salutas vin, karaj samideanoj, fratoj kaj fratinoj el la granda tutmonda homa familio, kiuj kunvenis el landoj proksimaj kaj malproksimaj, el la plej diversaj regnoj de la mondo, por frate premi al si reciproke la manojn pro la nomo de granda ideo, kiu ĉiujn nin ligas. Mi salutas vin ankaŭ, glora lando Francujo kaj bela urbo “Bulonjo-sur-Maró”, kiuj bonvole oferis gastamon al nia kongreso. Mi esprimas ankaŭ koran dankon al tiuj personoj kaj institucioj en Parizo, kiuj ĉe mia trapaso tra tiu ĉi glora urbo esprimis sub mia adreso sian favoron por la afero Esperanto, nome al s-ro la ministro de la Publika Instruado, al la Urbeŝtraro de Parizo, al la Franca Ligo de Instruado kaj al multaj diversaj sciencaj eminentuloj.

Sankta estas por ni la hodiaŭa tago. Modesta estas nia kunveno; la mondo ekstera ne multe scias pri ĝi, kaj la vortoj, kiuj estas parolataj en nia kunveno, ne flugos telegrafe al ĉiuj urboj kaj urbetoj de la mondo; ne kunvenis regnestroj, nek ministroj, por ŝanĝi la politikan karton de la mondo, ne brilas luksaj vestoj kaj multego da imponantaj ordenoj en nia salono, ne bruas pafleĝoj ĉirkaŭ la modesta domo, en kiu ni troviĝas; sed tra la aero de nia salono flugas misteraj sonoj, sonoj tre mallaŭtaj, ne aŭdeblaj por la orelo, sed senteblaj por ĉiu animo sentema:

ĝi estas la sono de io granda, kio nun naskiĝas. Tra la aero flugas misteraj fantomoj; la okuloj ilin ne vidas, sed la animo ilin sentas; ili estas imagoj de tempo estonta, de tempo tute nova. La fantomoj flugos en la mondon, korpigiĝos kaj potenciĝos, kaj niaj filoj kaj nepoj ilin vidos, ilin sentos kaj ĝuos.

En la plej malproksima antikveco, kiu jam de longe elviŝiĝis el la memoro de la homaro, kaj pri kiu nenia historio konservis al ni eĉ la plej malgrandan dokumenton, la homa familio disiĝis kaj ĝiaj membroj ĉesis kompreni unu la alian. Fratoj kreitaj ĉiuj laŭ unu modelo, fratoj, kiuj havis ĉiuj egalan korpon, egalan spiriton, egalajn kapablojn, egalajn idealojn, egalan Dion en siaj koroj, fratoj, kiuj devis helpi unu la alian kaj labori kune por la feliĉo kaj la gloro de sia familio, – tiuj fratoj fariĝis tute fremdaj unuj al aliaj, disiĝis ŝajne por ĉiam en malamikajn grupetojn, kaj inter ili komenciĝis eterna milito. En la daŭro de multaj miljaroj, en la daŭro de la tuta tempo, kiun la homa historio memoras, tiuj fratoj nur eterne bataladis inter si, kaj ĉia interkompreniĝado inter ili estis absolute ne ebla. Profetoj kaj poetoj revadis pri ia tre malproksima nebula tempo, en kiu la homoj denove komencos komprenadi unu la alian kaj denove kuniĝos en unu familion: sed tio ĉi estis nur revo. Oni parolis pri tio, kiel pri ia dolĉa fantazio, sed neniu pr-

enis ĝin serioze, neniu kredis pri ĝi.

Kaj nun la unuan fojon la revo de miljaroj komencas realiĝi. En la malgrandan urbon de la franca marbordo kunvenis homoj el la plej diversaj landoj kaj nacioj, kaj ili renkontas sin reciproke ne mute kaj surde, sed ili komprenas unu la alian, ili parolas unu kun la alia kiel fratoj, kiel membroj de unu nacio. Ofte kunvenas personoj de malsamaj nacioj kaj komprenas unu la alian; sed kia grandega diferenco estas inter ilia reciproka kompreniĝado kaj la nia! Tie komprenas sin reciproke nur tre malgranda parto da kunvenintoj, kiuj havis la eblon dediĉi multegon da tempo kaj multegon da mono, por lerni fremdajn lingvojn – ĉiuj aliaj partoprenas en la kunveno nur per sia korpo, ne per sia kapo; sed en nia kunveno reciproke sin komprenas ĉiu, kiu nur deziras nin kompreni, kaj nek malriĉeco, nek nehavado de tempo fermas al iu la orelojn por niaj paroloj. Tie la reciproka kompreniĝado estas atingebla per vojo nenatura, ofenda kaj maljusta, ĉar tie la membro de unu nacio humiliĝas antaŭ membro de alia nacio, parolas lian lingvon, hontigante la sian, balbutas kaj ruĝiĝas kaj sentas sin ĝenata antaŭ sia kunparolanto, dum tiu ĉi lasta sentas sin forta kaj fiera; en nia kunveno ne ekzistas nacioj fortaj kaj malfortaj, privilegiitaj kaj senprivilegiitaj, neniu humiliĝas, neniu sin ĝenas; ni ĉiuj sentas nin kiel membroj de unu nacio, kiel membroj de unu familio, kaj la unuan fojon en la homa historio ni, membroj de la plej malsamaj popoloj staras unu apud alia ne kiel fremduloj, ne kiel konkurantoj, sed kiel fratoj, kiuj ne altrudante unu la alia sian lingvon, komprenas sin reciproke, ne suspektas unu la alian pro mallumo ilin dividanta, amas sin reciproke kaj premas al si reciproke la manojn ne hipokrite, kiel alinaciano al alinaciano, sed sincere, kiel homo al homo. Ni konsciu bone

la tutan gravecon de la hodiaŭa tago, ĉar hodiaŭ inter la gastamaj muroj de Bulonjo-sur-Marco kunvenis ne Francoj kun Angloj, ne Rusoj kun Poloj, sed homoj kun homoj. Benata estu la tago, kaj grandaj kaj gloraj estu ĝiaj sekvoj!

Ni kunvenis hodiaŭ, por montri al la mondo, per faktoj nerefuteblaj, tion, kion la mondo ĝis nun ne volis kredi. Ni montros al la mondo, ke reciproka kompreniĝado inter personoj de malsamaj nacioj estas tute bone atingebla, ke por ĉi tio tute ne estas necese, ke unu popolo humiligu aŭ englutu alian, ke la muroj inter la popoloj tute ne estas io necesega kaj eterna, ke reciproka kompreniĝado inter kreitaĵoj de tiu sama speco estas ne ia fantazia revo, sed afero tute natura, kiu pro tre bedaŭrindaj kaj hontindaj cirkonstancoj estis nur tre longe prokrastita, sed kiu pli aŭ malpli frue nepre devis veni kaj kiu fine nun venis, kiu nun elpaŝas ankoraŭ tre malkuraĝe, sed, unu fojon ekirinte, jam ne haltos kaj baldaŭ tiel potencege ekregos en la mondo, ke niaj nepoj eĉ ne volos kredi, ke estis iam alie, ke la homoj, la reĝoj de la mondo, longan tempon ne komprenis unu la alian! Ĉiu, kiu diras, ke neŭtrala arta lingvo estas ne ebla, venu al ni, kaj li konvertiĝos. Ĉiu, kiu diras, ke la parolaj organoj de ĉiuj popoloj estas malsamaj, ke ĉiu elparolas artan lingvon alie kaj la uzantoj de tia lingvo ne povas kompreni unu la alian, venu al ni, kaj, se li estas homo honesta kaj ne volas konscie mensogi, li konfesos, ke li eraris. Li promenadu en la venontaj tagoj en la stratoj de Bulonjo-sur-Marco, li observadu, kiel bonege sin komprenas reciproke la reprezentantoj de la plej diversaj nacioj, li demandu la renkontatajn Esperantistojn, kiom multe da tempo aŭ mono ĉiu el ili dediĉis por ellerni la artan lingvon, li komparu tion ĉi kun la grandegaj oferoj, kiujn postulas la lernado de ĉiu lingvo natura, – kaj, se li estas homo



La kongresanaro antaŭ la kongreso

honestaj, li iru en la mondon kaj ripetadu laŭte: “Jes, lingvo arta estas tute ebla, kaj la reciproka komprenigado de homoj per neŭtrala arta lingvo estas ne sole tute ebla, sed eĉ tre kaj tre facila.” Estas vero, ke multaj el ni posedas nian lingvon ankoraŭ tre malbone kaj malfacile balbutas, anstataŭ paroli flue; sed, komparante ilian balbutadon kun la perfekte flua parolado de aliaj personoj, ĉiu konsciencia observanto facile rimarkos, ke la kaŭzo de la balbutado kuŝas ne en la lingvo, sed nur en la nesufiĉa ekzerciteco de la diritaj personoj.

Post multaj miljaroj da reciproka surda-muteco kaj batalado, nun en Bulonjo-sur-Maró fakte komenciĝas en pli granda mezuro la reciproka komprenigado kaj fratiĝado de la diverspopolaj membroj de la homaro; kaj unu fojon komenciĝinte, ĝi jam ne haltos, sed irados antaŭen ĉiam pli kaj pli potence, ĝis la lastaj ombroj de la eterna mallumo malaperos por ĉiam. Gravegaj estas la nunaj tagoj en Bulonjo-sur-Maró, kaj ili estu benataj!

En la unua kongreso de la Esperantistoj estas necese diri kelkajn vortojn pri la ĝisnunaj batalantoj de nia afero. Sed antaŭ ol mi parolos pri la batalantoj speciale Esperantaj, mi sentas la devon diri ĉi tie kelkajn vortojn pri unu

homo, kiu havas tre grandajn meritojn en nia afero kaj al kiu bedaŭrinde la Esperantistoj ofte rilatas maljuste nur tial, ĉar li, multe farinte por la ideo de lingvo internacia ĝenerale, ne apartenas tamen al la amikoj de tiu speciala lingva formo, por kiu ni batalas. Mi parolas pri la tre estiminda sinjoro Johann Martin Schleyer, la aŭtoro de Volapük. La lingva formo, por kiu laboris tiu respektata maljunulo, montriĝis ne bona, kaj la afero, por kiu li batalis, baldaŭ falis, kaj per sia falo ĝi alportis grandan malutilon al nia ideo entute kaj precipe al tiu speciala formo de la ideo, por kiu ni batalas. Sed ni devas esti justaj, ni devas taksi ĉiun homon ne laŭ lia venko aŭ malvenko, sed laŭ liaj laboroj. Kaj la laboroj kaj meritoj de sinjoro Schleyer estis tre grandaj. Kun granda fervoro li laboris por la ideo de lingvo internacia en la daŭro de multaj jaroj; dum multaj personoj donadis nur nudajn projektojn, li estis la unua, kiu havis sufiĉe da pacienco, por ellabori plenan lingvon de la komenco ĝis la fino (kvankam Esperanto tiam estis jam preta, ĝi ne estis ankoraŭ publikigita), kaj ne estas lia kulpo, se la lingvo montriĝis ne praktika. Li estis la unua, kiu per senlaca laborado vekis la intereson de la mondo por la ideo de

lingvo neŭtrala, kaj ne estas lia kulpo, se lia falinta afero por longa tempo malvarmigus la mondon por ĉia arta lingvo. Li volis fari grandan bonon, kaj por la atingo de tiu bono li laboris tre multe kaj fervore, kaj ni devas lin taksi ne laŭ lia sukceso, sed laŭ lia volo kaj laboro. Se la ideo de lingvo internacia iam venkos la mondon – tute egale, ĉu ĝi estos sub la formo de Esperanto aŭ de ia alia lingvo – la nomo de Schleyer okupos ĉiam la plej honoran lokon en la historio de nia ideo, kaj tiun ĉi nomon la mondo neniam forgesos. Mi esperas, ke mi esprimos la opinion de ĉiuj partoprenantoj en nia kongreso, se mi diros: “Ni esprimas nian dankon al sinjoro Schleyer, la unua kaj plej energia pioniro de la ideo de neŭtrala lingvo internacia!”

Nun mi transiros al la laborantoj speciale Esperantistaj. Ne venis ankoraŭ la tempo skribi oficialan historion de nia afero, kaj mi timas, ke mi povus fari ian publikan maljustaĵon al tiu aŭ alia persono ĉe la kompara takso de la meritoj de la diversaj batalantoj. Tial mi ne nomos ĉiun el ili aparte, sed al ĉiuj kune mi esprimas dankon pri ilia laborado en la nomo de ĉiuj amikoj de Esperanto. Dek ok jaroj pasis de la tago, kiam Esperanto aperis en la mondo. Ne facilaj estis ĉi tiuj dek ok jaroj. Nun mi vidas antaŭ mi grandegan nombron da varmegaj amikoj de Esperanto, kiuj reprezentas per si preskaŭ ĉiujn landojn de la tera globo, preskaŭ ĉiujn naciojn de la mondo, ĉiujn ran-



Grupo da kongresanoj elvenas el la kongresejo

gojn, statojn kaj klasojn de la homoj. Tre granda kaj vasta estas jam nia literaturo, tre multaj estas niaj gazetoj, en la tuta mondo ni havas nun grupojn kaj klubojn Esperantistajn, kaj al neniu klera homo en la mondo la nomo de nia afero nun estas jam nekonata. Kiam mi rigardas la nunan brilantan staton de nia afero, mi rememoras kortuŝite pri la unuaj pioniroj, kiuj laboris por nia afero en tiu malĝoja tempo, kiam ni ĉie renkontadis ankoraŭ nur mokon kaj persekuton. Multaj el ili vivas ankoraŭ kaj ili rigardas nun kun ĝojo la fruktojn de sia laborado. Sed ho ve, multaj el

niaj pioniroj jam ne vivas. Dek ok jaroj estas granda peco da tempo. En tiu ĉi granda spaco da tempo la morto rabis al ni tre multe el niaj fervoraj kunbatalantoj. Citi ĉiujn nomojn estus nun afero ne ebla; mi

nomos nur kelkajn el ili. La plej frue forlasis nin Leopoldo Einstein, la unua energia propagandisto de nia afero; lia morto estis granda bato por nia afero entute, kaj speciale por ĝia disvastiĝado en Germanujo. Poste la morto rabis al ni Jozefon Wasniewski, la simpatian kaj de ĉiuj amatan apostolon de nia afero en Polujo. Kaj antaŭ kelke da jaroj mortis tiu persono, al kiu Esperanto ŝuldas multe, tre multe kaj sen kiu nia afero nun eble tute ne ekzistus: mi parolas pri la neforgesebla W.H. Trompeter. Neniam parolante pri si, postulante nenan dankon, li prenis sur siajn ŝultrojn nian tutan aferon, kiam ĝi troviĝis en la plej malfacilaj cirkon-

stancoj; li sola subtenadis ĝin tiel longe, ĝis la nombro de la Esperantistoj fariĝis sufiĉe granda, por subtenadi la aferon per fortoj komunaj. Kiel li ĝojus nun, se li vidus la nunan staton de nia afero!

Krom la nomitaj tri personoj estas ankoraŭ granda, ho ve, tre granda nombro da personoj, kiuj multe laboris por nia afero kaj ne povas vidi la fruktojn de siaj laboroj. Ili mortis korpore, sed ili ne mortis en nia memoro. Mi proponas, estimataj sinjorinoj kaj sinjoroj, ke ni honoru ilian memoron per leviĝo de niaj seĝoj. Al la ombroj de ĉiuj mortintaj batalantoj Esperantistaj la unua kongreso Esperantista esprimas sian respekton kaj pian saluton.

Al Vi, ho potenca senkorpa mistero,
Fortego, la mondon reganta,
Al Vi, granda fonto de l' amo kaj vero
Kaj fonto de vivo konstanta,
Al Vi, kiun ĉiuj malsame prezentas,
Sed ĉiuj egale en koro Vin sentas,
Al Vi, kiu kreas, al Vi kiu reĝas,
Hodiaŭ mi preĝas.

Al Vi ni ne venas kun kredo nacia,
Kun dogmoj de blinda fervoro:
Silentas nun ĉiu disput' religia
Kaj regas nur kredo de koro.
Kun ĝi, kiu estas ĉe ĉiuj egala,
Kun ĝi, la plej vera, sen trudo batala,
Ni staras nun, filoj de l' tuta homaro
Ĉe via altaro.

Homaron Vi kreis perfekte kaj bele,
Sed ĝi sin dividis batala;
Popolo popolon atakas kruele,
Frat' fraton atakas ŝakale,
Ho, kiu ajn estas Vi, forto mistera,
Aŭskultu la voĉon de l' preĝo sincera,
Redonu la pacon al la infanaro
De l' granda homaro!

Baldaŭ komenciĝos la laboroj de nia kongreso, dediĉita al vera fratiĝo de la homaro. En tiu ĉi solena momento mia koro estas plena de io nedefinebla kaj mistera, kaj mi sentas la deziron faciligi la koron per ia preĝo, turni min al iu plej alta forto kaj alvoki ĝian helpon kaj benon. Sed tiel same kiel mi en la nuna momento ne estas ia naciismo, sed simpla homo, tiel same mi ankaŭ sentas, ke en tiu ĉi momento mi ne apartenas al ia nacia aŭ partia religio, sed mi estas nur homo. Kaj en la nuna momento staras inter miaj animaj okuloj nur tiu alta morala Forto, kiun sentas en sia koro ĉiu homo, kaj al tiu ĉi nekonata Forto mi turnas min kun mia preĝo:

Preĝo sub la verda standardo



Ni ĵuris labori, ni ĵuris batali,
Por reunuigi l' homaron.
Subtenu nin, Forto, ne lasu nin fali,
Sed lasu nin venki la baron;
Donacu Vi benon al nia laboro,
Donacu Vi forton al nia fervoro,
Ke ĉiam ni kontraŭ atakoj sovaĝaj
Nin tenu kuraĝaj.

La verdan standardon tre alte ni tenos:
Ĝi signas la bonon kaj belon.
La Forto mistera de l' mondo nin benos,
Kaj nian atingos ni celon.
Ni inter popoloj la murojn detruos,
Kaj ili ekkrakos kaj ili ekbruos,
Kaj falos por ĉiam, kaj amo kaj vero
Ekregos sur tero

Fonto: <http://esperantio.narod.ru/lingve/zajxoj/listo.htm>

Martinus en diversaj lingvoj

Superrigardo 2010

X = eldonita

O = tradukita

Novajoj markitaj per griza koloro

	Albana	Angla	Ĉeĥa	Ĉina	Esperanta	Finna	Franca	Germana	Hispana	Hungara	Islanda	Itala	Japana	Kroata	Litova	Nederlanda	Pola	Portugala	Rumana	Rusa	Serba	Sveda
Livets Bog 1 (La Libro de la Vivo)		X	X		X	O	X	X	X		O			X		O				O	X	X
Livets Bog 2		X	X		O			X	X					O		O				O	O	X
Livets Bog 3		O	O		O			O	X							O					O	X
Livets Bog 4		X	O		O			O								O					O	X
Livets Bog 5			O		O			O			O					O					O	X
Livets Bog 6			O		O			O								O					O	X
Livets Bog 7			O		O			O								O					O	X
La Eterna Mondbildo 1		X	O	X	X	O	X	X	X	X	X			X		X	O	O	X	O	X	X
La Eterna Mondbildo 2		X	O	X	X		X	X	X	X	X					X	O	O	X	O	O	X
La Eterna Mondbildo 3		X	O	X	X		O	X	X							X	O		X	O	O	X
La Eterna Mondbildo 4		X	O	X	X			X	X							O	O		X	O	O	X
Logiko		X	X		X			X						X		O			X		X	X
Sepulto			X		O			X													O	X
La intelektigita kristanismo																	O					
Kolekto de artikoloj 1																						
1 La sorto de la homaro		X	X	X	X		X	X	X			X		X		X		X		X	X	X
2 Pasko		X	O		X			X	X		X			X		X	O		O	X		X
3 Kio estas la vero?			O		X			X	X							X						X
4 Ĉirkaŭ la naskiĝo de mia misio		X	X		X		X	X	X	X						X						X
5 La ideala nutraĵo		O	X	X	X	X	X	X	X			X	X	X	X	X	X	X	X	X	X	X
6 Folioj el la bildolibro de Dio		X	O		X			X								O						X
7 La idolo plej longe vivanta			O		X			X		X	O					O						X
8 La homaro kaj la mondbildo		O	X		X			X				X				O			O			X
9 Inter du mondepokoj			O		X			X														X
10 Kosma konscio		X	X		X			X								O						X
11 La mistero de la preĝo		X	X		X		X	X	X					X	X	X	X		X	X		X
12 La vojo al iniciĝo		X	O		O			X														X
13 La kristnaska evangelio			O		O		X	X														X
14 La kreado de la konscio			O																			
15 El la mallumo			O																			O
16 La principo de reenkarniĝo		X	O					X												X		O
17 Mondreligio kaj mondpolitiko		X	O					X														O
18 La sortoludo de la vivo			O																			O
19 Kosmaj ekbriloj			O																			X
20 Medito		X	O						X													X
21 Trans la mortotimo			O					X												X		O
22 La vojo de la vivo		X	O					X									X					X
23 La senmorteco de la vivaj estuloj		X	O										X			X						X
24 La kreado de la kulturo			X																			X
25 La vojo al paradizo		X	O					X	X					X		O				O		X
26 Diabolkonscio kaj kristokonscio			O					X														O
27 La kreado de la mondpaco			O					X														X
28 Du specoj de amo			O					X	X							X						X
Tra la pordo de la morto		O	O				X	X						X		X				X	X	X
La strukturo de kunlaboro							O	O												X		
Kosmaj lecionoj (artikoloj)			O							X				X						X		X
Enkonduko (Broŝuro)		X		X	X		X	X			X	X	X					X		X		X
Revuo Kosmos		X			X			X								X						X

Martinus 5

La dia kread-principo

La malluma elradiado

de Erik Gerner Larsson



Por ke la nova spirita mondimpulso, kiu estas la kondiĉo de la fina venko de l'umo en la tuta surtera homaro, povas fariĝi memtravivita fakto por ĉiu homo, estas necese dum momento halti ĉe tiu eco ĉe la vivanta estaĵo, kiu estas la kondiĉo, por ke evoluo entute povas okazi, nome: *la dia kread-principo*. Pri la supera kosma analizo de ĉi tiu principo, al kiu ni poste revenos, ni povas nun ĉi tie nur diri, ke ĝi estas absolute eterna en sia naturo, ne estante rezulto de antaŭiranta pensado, per kio ĝi diferenciĝas de l'limiĝo de *tio, kio estas kreita*.

Por kompreni, ke la dia kread-principo estas la fundamento de ĉiu evoluo, jes, entute por la vivpercepto, estas necese, ke oni povas atenti ĝin en ĝia tuteca evoluo. Tian tutecan evoluon ni havas en tio, kion Martinus nomas *evolu-spiralo*, kaj kiu estas limigita spaco, interne de kiu ĉiuj ĉefaj fundamentaj principoj de la kosmo egale manifestiĝas. La studo de la dirita limigita spaco senŝanĝigas, ke la dia kread-principo ĉi tie aperas kun du tute reciprokaj tendencoj, el kiuj unu estas supera en la unua duono de la spiralo, dum la alia superiĝas en la lasta duono, kio denove kondiĉigas, ke la travivado de evolu-spiralo formiĝas treege kontraste.

Ĉar la efikoj de la kread-principo en la unua duono de la spiralo celas

evolui la avidon pri la materio, dum en la lasta duono la celo estas kontraŭa, tiam ni vidas ĉi tie, ke la travivado de la unua duono estas travivado, kiu pli kaj pli malproksimigas la individuon de ĉiuj aliaj vivantaj estaĵoj profite de spertoj pri si mem, estado, kiun Martinus esprimas kiel la plej granda disiĝo de la patro.

Ĉar tia al kulminacio proksimiĝanta evoluo de *egoismo* aŭ nesatigebla avido je posedaĵoj nepre progresigas ĉiujn tendencojn, kiujn ni konas sub la nomoj de malamo, envio, nekomplezemo, potencavido, k.t.p. aŭ mallonge dirita: ĉio, kion ni nomas *la malbono*, tial Martinus karakterizas ĉi tiun flankon de la dia kread-principo kiel *la malluman elradiadon*. Ĉar la travivado de ĉi tiu malluma elradiado tamen riĉigas la konscion de la vivanta estaĵo per centprocenta memspertita kono de la karaktero de *la mallumo*, kaj ĉi tiu kono estas la nepre necesa fundamento de la travivado de *la lumo*, tiam fariĝos evidenta, ke la plej interna naturo de la mallumo ne esprimas, ke la vivanta estaĵo travivas koleron kaj persekuton de Dio, sed kontraŭe la malluman fonon sur kiun la lumaj energioj de la estado povas desegni siajn feliĉigajn konturojn.

Daŭrigota

Tradukis Margrethe Noll en 1939

96-a UK en Kopenhago 23 – 30 julio 2011



Kongresa logo,
96-a UK en Kopenhago

Jam trifoje la Universala Kongreso de Esperanto okazis en Kopenhago, nome en 1956, 1962 kaj 1975. Nur en kvar aliaj urboj la UK okazis trifoje, nome en Antverpeno, Berno, Budapeŝto kaj Varsovio. Sed neniam antaŭe la UK kvarfoje okazis en la sama urbo, tamen en 2011 la UK por la kvara fojo okazos en Kopenhago.

En 2009 dum la lasta tago de la 94-a UK en la zamenhofa naskiĝurbo Bjalistoko la estraro de UEA inter la du kandidatoj Madrido kaj Kopenhago elektis Kopenhagon kiel gastiganton por la 96-a UK en 2011. En la Loka Kongresa Komitato (LKK) sidas Ileana Schröder, Arne Casper, Tara Gregers, Rasmus Høyrup, Bent Jensenius, Jens Larsen, Regin Larsen, Ole Therkelsen kaj Finn Østerbæk.

La 96-a UK okazos en la granda kongresejo Bella Centro, kiu fariĝis mondkonata dum la granda internacia klimata konferenco en decembro 2009, en kiu partoprenis dekoj da ŝtatestroj, inter aliaj Barack Obama. Dimanĉe la nacia vespero okazos en la koncerthalo de la mondfama amuŝgardeno “Tivoli”, kaj ankaŭ dimanĉe la kongresa ekumena diservo okazos en la ĉefa katedralo de Kopenhago. La ILEI-konferenco okazos en salono de la Universitato de Kopenhago. (ILEI = Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj).

Kosmologiaj kursoj en Martinus Centro, Klint, okazos 30-a julio – 6-a aŭgusto en la semajno post la UK en Kopenhago. /Ole Therkelsen



E-semajno en Martinus-Centro en 2011

Inter 30-a julio kaj 6-a de aŭgusto 2011 la esperanto-semajno en Klint okazos paralele kun dana, sveda, angla kaj germana kursoj en internacia etoso. Matene estos interpretata prelego, poste studrondo, posttagmeze estos konversacia rondo. Ne estos prelegoj rekte en Esperanto, nur interpretitaj en la granda prelegejo. En la vespero estos distra programo kaj teo kaj kukoj en la restoracio "Terrassen". /Ole Therkelsen



Kolumbia grupo

Internaciaj gastoj en Martinus Centro en Klint

Dum la somero 2010 ne estis Esperanto-semajno en Klint, sed tamen la somero estis sufiĉe internacia. La plej ekzotaj gastoj estis du virinoj el Ĉinio. Unue venis Liu "Nuba" Yunxia, kiu en 1998 la unuan fojon aŭdis pri la kosmologio en Pekino dum esperanta prelego de Ole Therkelsen. Poste ŝi transloĝiĝis al Kolonjo en Germanio, kie ŝi tradukis du libretojn el Esperanto en la ĉinan lingvon: *La sorto de la homaro* kaj *La ideala nutraĵo*. (Vidu paĝo 20). Sekve venis dua ĉina gasto, Amy Chong, kiu partoprenis en angla studgrupo. Dum vizito de sveda Anders Bränngård en Ĉinio, ŝi la unuan fojon aŭdis pri Martinus kaj lia verko.

Dum la somero kvin hungaroj neesperantistaj studis en la centro pere de la angla lingvo. Nova hungara ret-paĝo estas: www.harmadiktestamentum.hu.

La pinto estis vizito de 14 personoj el fora sudamerika Kolumbio. La hispana tradukisto Martha Font starigis hispanan studrondon, kaj la danaj kaj svedaj prelegoj estis interpretitaj en la hispanan lingvon.

Kiel kutime estis gastoj de pluraj diversaj landoj uzante la anglan lingvon. Ĉi jare estis du paralelaj studgrupoj por la germanoj. /Ole Therkelsen

INFORMO PRI

LA TRIA TESTAMENTO

La celo de la revuo Kosmos estas doni enrigardon en tiun mondbildon, kiun la verkisto Martinus (1890-1981) priskribis en vico da libroj kun la kumuna titolo: La Tria Testamento.

La mondbildo de Martinus estas logika analizo de la spiritaj leĝoj kaj principoj de la vivo. La nova mondbildo estas studebla per la libroj de Martinus, kiuj eldoniĝas de la Martinus-Instituto, kaj per prelegoj, kursoj, studrondoj kaj informoj en la Interreto. Okazas aktivecoj en la Martinus-Instituto en Kopenhago, en la Martinus-Centro en Klint ĉe Nykøbing Sjælland, en aliaj lokoj en Danio kaj eksterlande. Pliajn informojn oni ricevas kontaktante la Martinus-Instituton. La disvastiĝo de la konoj pri La Tria Testamento okazas sen ia formo de membreco aŭ kreado de asocio.

La frontpaĝa bildo:

S-ro Michaux kaj d-ro Zamenhof (1905)

Eldonanto: Martinus-Instituto

Mariendalsvej 94-96

DK-2000 Kopenhago

Tel: (+45) 38 34 62 80

fakso (+45) 38 34 61 80

Telefontempo:

lundo-ĵaŭdo 13-16

vendredo: 9-12

DK p.ĝiro 642-9580

UEA-kodo mins-d

www.martinus.dk

info@martinus.dk

www.shop.martinus.dk

Redakcio: Ole Therkelsen (respondeca),

Helen Claesson kaj Jonas Dalmose.

Kompostado: Dan Elhaŭge.

Abono: Jare 2 ekzempleroj

Prezo en EU: DKK 75,00 aŭ EUR 10,00

Prezo ekster EU: DKK 56, EUR 8,00 aŭ USD 10,00

Unuopaj kajeroj: DKK 40,00

Se vi ne povas pagi per fremda valuto, demandu al la Instituto

Kopirajto: © Martinus Institut

Redono de teksto nur laŭ skriba permeso.

ISSN 1600 4116.



La tuta verkaro de Martinus havas la titolon *La Tria Testamento*. La ĉefa verko estas *Livets Bog* en sep volumoj. Kiel suplemento al tiu li skribis *La Eterna Mondbildo 1-4*, kie li per koloraj simboloj kaj klarigaj tekstoj montras la ĉefajn principojn en la mondbildo. Krome li skribis la librojn *Logiko*, *Sepulto* kaj *La Intelektigita Kristanismo* kaj 28 libretojn kaj grandan nombron da artikoloj.

La libroj estas aĉeteblaj en reta vendejo de Martinus-Instituto: shop.martinus.dk

Libroj en Esperanto

Livets Bog I (La Libro de la Vivo)

La Eterna Mondbildo 1-2

La Eterna Mondbildo 3-4

Logiko

1. La sorto de la homaro

2. Pasko

3. Kio estas la vero?

4. Ĉirkaŭ la naskiĝo de mia misio

5. La ideala nutraĵo

6. Folioj el la bildolibro de Dio

7. La idolo plej longe vivanta

8. La homaro kaj la mondbildo

9. Inter du mondepokoj

10. Kosma konscio

11. La mistero de la preĝo